

话筒

Mikrofone

(Junie-Septembre, 2007)

Raporto pri la 92-a UK

**80-jariĝis la Ĉina Popola Liberiga Armeo
Okazis la sepa pinta konferenco de
la Ŝanhaja Kunlabora Organizo**

Vizito al la Ĉiela Altaro

Enkonduko



Karaj legantoj, mi sincere petas vian pardonon pro malfruiĝo de eldonado de tiu ĉi numero! La malfruiĝon kaŭzis ĉefe la teknika fako, kiu faras komputilan paĝ-aranĝadon por dekoj da gazetoj kaj al kiu ŝajne mankas sufiĉaj laborantoj. Vi ja scias, ke Ĉina Radio Internacia elsendadas radio-programojn en 38 fremdaj lingvoj kaj preskaŭ ĉiu lingvo-redakcio havas propran informilon. Peza laboro por la teknika fako, tamen tio ne povas esti ekskuzo por nia prokrasto. Mi promesas, ke la venontaj numeroj de nia kuriero estu pli akurataj!

Tiu ĉi numero oferas al vi informojn pri gravaj aferoj okazintaj en kaj ekster Ĉinio, kiaj celebros al 80-jariĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo en la 1-a de aŭgusto kaj la 7-a Pinta Konferenco de la Ŝanhaja Kunlabora Organizo okazinta la 16-an de aŭgusto en Biŝkeko. Ankaŭ diversaj preparoj kaj aktivadoj por la Pekinaj Olimpikoj tiras atenton de la tuta mondo.

Sed por ni, esperantistoj, plej imponas kompreneble la Universala Kongreso de Esperanto. La ĉi-jara UK okazis, kiel vi scias, en la fama japana havenurbo Jokohamo. La malalta rango de ĝia Alta Protektanto tamen neniom reduktis ĝian imponecon, evidentiĝintan precipe el la diligentecon kaj disciplinitecon de la japanaj samideanoj. 3 raportistoj de la Esperanto-redakcio de Ĉina Radio Internacia havis la bonŝancon persone sperti la varman etoson de la festo de tutmondaj esperantistoj. Ni gardis nian promeson kaj faris la plej rapidan kaj detalan raportadon pri la UK per ĉiuj rimedoj. Same kiel en la lastaj Universalaj Kongresoj, ni malfermis specialan kanalon pri la 92-a UK en nia retpaĝaro. Ĉiutage ni sendis novaĵojn, intervjuojn, sonmaterialojn kaj bildojn el Jokohamo al Pekino, por ke niaj aŭskultantoj kaj legantoj, kiuj ne iris al Japanio, povu informiĝi pri la plej aktuala procezo de la kongreso. En tiu ĉi numero vi legos ankaŭ interesajn artikolojn de niaj du junaj redaktoroj pri iliaj neforgeseblaj travivaĵoj en Japanio.

Ĝuu la legadon!
Kun koraj salutoj,

Jianping Zhao

Informoj el Ĉinio

80-jariĝis la Ĉina Popola Liberiga Armeo

La 1-a de aŭgusto ĉi-jare estis la 80-a datreveno de fondiĝo de la Ĉina Popola Liberiga Armeo. Antaŭtagmeze de la sama tago, en la Popola Halo de Pekino, okazis soleno por la 80-jara jubileo. Al la soleno ĉeestis ĉinaj partiaj kaj ŝtataj gvidantoj Hu Jintao, Wu Bangguo, Wen Jiabao kaj aliaj.

Hu Jintao, ĝenerala sekretario de la Komunista Partio de Ĉinio, ŝtata prezidanto kaj prezidanto de la ĉina Centra Militafera Komisiono, faris parolon. Li diris: “En la pasintaj 80 jaroj la Ĉina Popola Liberiga Armeo tutkore kaj plenanime servis al la popolo, kuraĝe luktis por naciaj sendependigo kaj digno, sociaj evoluo kaj progreso, kaj faris gravan kontribuon por protekti mondan pacon kaj akceli progreson de la homaro.”

Post la 80-jara penado la Ĉina Popola Liberiga Armeo ege progresis en revoluciigo, modernigo kaj reguligo, edukinte grandan nombron da altkvalitaj militaferaj fakuloj; ĝia kapablo en plenumado de la misio senĉese plifortiĝis; ĝi trovis por si konstruadan vojon de la popola armeo, konforman al la ĉina realo.



Okazis la sepa pinta konferenco de la Ŝanhaja Kunlabora Organizo

La 16-an de aŭgusto, en Biŝkeko, la ĉefurbo de Kirgizstano, sukcese okazis la 7-a Pinta Konferenco de la membrolandoj de la Ŝanhaja Kunlabora Organizo. Ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao partoprenis en la Konferenco kaj kune kun la ŝtatestroj de membrolandoj de la Organizo subskribis la Traktaton pri Bonnajbara Amikeca Kunlaboro inter la membrolandoj de la Organizo kaj aliajn gravajn dokumentojn.

Inter la subskribitaj dokumentoj, la Traktato pri Bonnajbara Amikeca Kunlaboro inter la membrolandoj de la Organizo fariĝis la plej brila atingo. La Traktato estas proponita de ĉina ŝtata prezidanto Hu Jintao en la lasta ŝanhaja pinta konferenco kaj farita sub la antaŭenpuŝo de Ĉinio. Ĝi leĝe konfirmis la esperon de popoloj de membrolandoj por degeneraci-al-generacia amikeco kaj ĉiama paco kaj estas grava mejloŝtono de la procezo de disvolviĝo de la Ŝanhaja Kunlabora Organizo.

Posttagmeze de la 17-a de aŭgusto, laŭ la loka tempo, membrolandoj de la Ŝanhaja Kunlabora Organizo okazigis komunan kontraŭterorisman militekzercadon "Paca Misio 2007" en rusa Chelyabinsk. Ŝtatestroj de ĉiuj membrolandoj de la Organizo spektis la militekzercadon. Post la ekzercado Hu Jintao intervidiĝis kun rusa prezidento



Putin. Li diris: "La militekzercado plene sukcesis. Ĝi ne nur manifestis la decidemon kaj volon de ĉiuj membrolandoj pri la rezoluta opono kontraŭ terorismo, sed ankaŭ forte antaŭenpuŝos la Organizon ludi pli grandan rolon en protektado de la regiona sekureco." Prezidento Putin opiniis, ke la ekzercado manifestas altan nivelon de la strategiaj partneraj rilatoj inter Rusio kaj Ĉinio kaj havas gravan signifon por protekti la regionajn sekurecon kaj stabilecon.

Aktivadoj por celebri jaron retrokalkule de olimpikoj

La 8-an de aŭgusto en diversaj lokoj de Ĉinio oni okazigis solenan ceremonion por celebri la retrokalkulon de unu jaro antaŭ la Pekinaj Olimpikoj. Tiutage en parkoj kaj sur placoj kelkcent miloj da pekinanoj partoprenis matenan sportadon por esprimi sian subtenon al la Pekinaj Olimpikoj. Vespere la celebrazingis kulminon sur la placo Tian'anmen.



Vespere sur la placo Tian'anmen okazis solena ceremonio. Jacques Rogge, prezidanto de la Internacia Olimpika Komitato, disdonis invitilon al membroj de la Internacia Olimpika Komitato. Li invitas ĉiujn membrojn sendi sportistojn al la Pekinaj Olimpikoj. En sia parolo, li laŭdis Pekinon pro ĝia bona preparado, kaj alvokis junulojn el diversaj lokoj de la mondo kolektiĝi en Pekino post unu jaro. Li diris: "Olimpikoj estas grandioza ceremonio por diskonigo de la olimpika valoro kaj por diverslandaj junuloj revantaj pri sporto. Ĝi alportas sonĝon al junuloj kaj inspiras ilin. Mi alvokas, ke junuloj el diversaj lokoj de la mondo kolektiĝu en Pekino post unu jaro."



ĈIELA ALTARO

Antaŭ proksimume 600 jaroj, imperiestro Zhu Di de la dinastio Ming decidis konstruigi templon, kie imperiestroj povas fari kultadon al la ĉielo. El tio naskiĝis la majstreca verko arkitektura – la Ĉiela Altaro, nomata ĉinlingve Tian'tan. Nun la templaj konstruaĵoj kaj la ĉirkaŭa tereno formis unu el la plej grandaj parkoj en Pekino, ĉefurbo de Ĉinio.

Situanta en la suda urbo, la parko areojn de 273 hektaroj. Ĝi konsistas ĉefe el du grupoj da konstruaĵoj sur la nord-suda akso inerligataj per irvojo larĝa je tridek metroj kaj levita kvar metrojn super la tero. Norde estas la Halo de Preĝo por Riĉa Rikolto (ĉinlingve Qian'dian). Sude estas la Halo de Imperia Ĉielvolbo (Huangqiong'yu) kaj Ronda Altaro (Huanqiu'tan). Rigardate de supre, la suda parto de la parka muro montriĝas kvadrata, dum la norda parto duoncirkla, simbolante la antikvulan kredon, ke la ĉielo estas ronda kaj la tero kvadrata.

La Halo de Preĝo por Riĉa Rikolto impresas la vizitantojn per sia eksterordinara majesteco. Ĝi estas altega ronda konstruaĵo kun tritavolaj tegmentrandoj kaj konusforma tegmento el bluaj tegoloj kronita per

orumita globo. Ĉirkaŭas la halon grandspaca ringforma teraso el ŝtonoj en tri tavoloj, ĉiu borderita de balustrado el skulptita blanka marmoro. La konstruado de la halo estas inĝenia, la tuta halo 38 metrojn alta kaj 30 metrojn larĝa en la diametro, sin apogas sur 28 masivaj lignaj kolonoj, kun la centraj kolonoj nomataj la “drakputaj kolonoj”, altas je 19,2 metroj, kaj tiel dikas, ke eĉ du homoj ne povas kune ĝin ĉirkaŭbraki. Tiuj kolonoj reprezentas la kvar sezonojn. Ĉirkaŭ ili estas du ringoj, unu interne de la alia, po 12 kolonoj. La interna ringo simbolas la 12 monatojn de la jaro, kaj la ekstera la 12 unuojn de tagnokto laŭ la malnova ĉina maniero de diurna divido, tio estas, ke unu divido konsistas el du horoj, 12 unuoj do egalas 24 horojn de ĉiu tago. La konstrua ligno por tiuj 28 kolonoj estis transportita el la fora provinco Yunnan en sudokcidenta Ĉinio. Meze de la ŝtonplanko estas ronda marmorplato, sur kiu la naturo kreis drako-feniksan desegnon. La halo havas neniun muron, krom vandojn de kradoj. La plafono havas belege surpentritajn panelojn.



Interne de la parkmuroj de la Ĉiela Altaro videblas ankaŭ aliaj ekzemploj de la ĉina antikva arkitekturo, inkluzive de la Halo de la Ĉiela Imperiestro, Ĉiela Kuirejo, Buĉista Pavilono kaj la 72-sekcia Longa Koridoro. Impona estas la vasteco de la parko, kaj eĉ pli imponaj la centoj da antikvaj pinoj kaj cipresoj.

Laŭdire, kiam la imperiestro alvenis por preĝa ceremonio, lia eskorto povus nombri mil homojn. Tio certe estis spektakla fenomeno. En la jaro 1998, Unesko enlistigis la Ĉielan Altaron de Pekino en la Katalogon de Mondaj Kulturaj kaj Naturaj Heredaĵoj.

Per kodako, mi registris la 92-an UK

Kiam mi sciis en la lasta marto, ke kiel raportistino mi partoprenos en la 92-a Universala Kongreso en japana urbo Jokohamo, tiam mi atendis venon de la UK.


Finfine, matene de la 3-a de aŭgusto, iom ekscitita, iom nervoza, mi komencis mian vojaĝon al Jokohamo. Post preskaŭ 3-hora flugado, mi atingis flughavenon Narita en Tokio. En Narita, mi sentis ne fremdecon, sed hejmecon: Mi renkontiĝis kun multaj esperantistoj, kaj sinjoro Takira Minoru, helpanto de UK, estas unu el ili.

Sinjoro Takira Minoru loĝas en Kioto. Kiel mi, li scias malmulte pri la urbo Jokohamo. Por ke ni, fremdlandaj esperantistoj glate venu al propraj hoteloj, li telefonis al ĉiuj hoteloj, kiujn ni esperantistoj loĝos dum la UK, markis adresojn de la hoteloj en mapo kaj gvidis ĉiujn al iliaj hoteloj. Kiam mi atingis hotelon COSMO, jam vesperis.

En la halo, mi invitis sinjoron Takira Minoru kunfotiĝi. Vi povas vidi ioman lacecon sur la vizaĝo de Takira Minoru. Sed li devas reiri al la flughaveno Narita por daŭrigi sian laboron.

La 4-an de aŭgusto, post nokta ripozo, plena de vigla animo mi atingis la kongresejon. Ĉe la pordo mi fotiĝis kun la marko pri la 92-a UK, mi estas preta por bonvenigi la novan tagon. Do, kio okazos?





Fotado kaj intervjuo estas niaj ĉefaj taskoj dum la UK. Irite en la kongresejon, mi tuj troviĝis en la labora atmosfero. En la kongresejo, esperantistoj gaje babilis, subite du esperantistoj altiris miajn okulojn. Ili estas altaj kaj havasafablajn okulojn.

Mi ŝtele fotis ilin. Oh, ili trovis mian intencon kaj nature ridetis al mi. Tial ĉi tiu foto naskiĝis. Poste, mi proksimiĝis al ili, kaj memfide min prezentis, kaj esprimis mian ĝojon pri konatiĝo kun ili. Ni komencis nian babilon, kiel malnovaj amikoj. El la babilo, mi sciis, ke ili estas sinjoro Josef Šemer kaj Istvan Ertl, interalie familio de Esperanto de Istvan Ertl interesis min. Bonkora sinjoro Josef Šemer helpis al mi trovi silentan spacon por intervjuo al sinjoro Istvan Ertl.

Bona komenco estas duono de sukceso. Pro la unua sukcesa intervjuo, pliiĝis mia fido kaj kuraĝeco. En la postaj 7 tagoj, mi uzis la belan lingvon, Esperanto, intervjui, babili kaj kanti kun aliaj esperantistoj.

Oni ofte diris, ke kanto estas bela kaj oportuna interflua metodo. Kaj Esperanto estas la bona fenestro de interfluo, ĉu ne! Do, kia efiko okazos kiam kanto kaj Esperanto bone sin kombinas?

Dum la UK en la kongresejo, posttagmeze de iu tago, kiam mi ĵus finis intervjuon, eliris el ĉambro, mi tuj estis altirita de gaja kaj pura kanto. Gvidate de la voĉo, mi trovis ilin, kubajn esperantistojn. Ili sidis sur planko kaj libere kantis. Tiam, miaj piedoj ne povis marŝi plu, mia koro restis tie. Oh, mi estas introverta persono, plej mallerta en kantado, sed mi haltis, sidiĝis, sekvis ilin kaj komencis kantojn, unu post unu. Mi neniam sentis min tiel libera kaj gaja... Eĉ nun mi ankoraŭ ne scias la kialon, sed la memoro estas plej bela. Nun kiam mi fermas miajn okulojn, la kantoj sonas ĉe miaj oreloj. Pro la UK, mi min ekzercis, amikiĝis kun diverslokaj esperantistoj, kaj estas pli grave, ke mia koro estas purigita. Esperanto, amoplena, amika, paca kaj pura mondo.



Kunportante Esperanton, mi spertis Japanion

En la komenco de mia artikolo, mi elkore dankas Japanan Esperanto-Instituton pro ĝia invito al la 92-a Universala Kongreso de Esperanto en Jokohamo. Dum mia 24-jara vivo, la Jokohama UK estas la dua Universala Kongreso, kiun mi partoprenis, tamen estas mia la unua eksterlande. Do, por mi ĉio estas freŝa kaj impresodona. Kadre de tiu ĉi ŝanco mi ne nur partoprenis en la Jokohama UK, sed ankaŭ vojaĝis al 7 urboj de Japanio. Kunportante Esperanton, mi spertis Japanion.

Okayama → Himeĝi-Kastelo → Kuraŝiki

En la 30-a de julio, mi atingis al Okayama, tre kvieta urbo, mezokcidenta parto de Japanio, kaj loĝis kune kun la familio Harada. Mia akceptanto en Japanio estas s-ro Hideki Harada, fidela malnova aŭskultanto de nia Esperanto-elsendo. Li kaj lia edzino Husako havas 4 belajn filinojn, Misako kaj Satoko loĝas kune kun ili. Ili ĉiuj estas esperantistoj, do por mi estas tre facile fari interkomunikadon kun ĉiuj familianoj. Misako estas lerta esperantistino, Husako kaj Satoko estas lertegaj en kuirado. Ĉiuj familianoj estas tre gastamaj kaj zorgemaj. Kune vivantaj membroj ankaŭ estas unu hundo, nomata "ging", en la japana lingvo ĝi signifas arĝenton, kaj "momo-ĝang", signifanta persikon, ĉarma kuniklo. Kiam mi atingis la familion Harada, mi ja sentis, ke mia vojaĝo en Japanio certe estos neforgesebla.

La unua vidindaĵo, kiun mi vizitis, gvidate de s-ro Hideki Harada estis Korakuen-Ĝardeno en la urbo Okayama. Korankuen estas unu el la tri famaj ĝardenoj de Japanio kaj havas historion de pli ol 1 700 jaroj. La ĝardeno estas tre bela kaj kvieta, kaj estas ege bona komenco de mia vojaĝo. Posttagmeze de la sama tago, la 31-a de julio, mi vizitis Esperanto-klubon de la Sanyo-a Knabina Mezlernejo en Okayama. La lernejo estas malgranda, tamen ties Esperanto-klubo havas historion de pli ol 20 jaroj. En la lernejo oni ekspozicias Esperanto-librojn, eldonitajn antaŭ pli ol 100 jaroj, el ili estas libro por vizitantoj, sur kiu restas aŭtografo de sinjorino Klara Zamenhofo, la edzino de Lazaro Ludoviko Zamenhofo.

La 92-a Universala Kongreso de Esperanto, al kiu ĉeestis miloj da esperantistoj el pli ol 60 landoj, kaj en kiu oni interkomunikis per la internacia lingvo Esperanto, vekis atenton de la televida stacio de NHK (Japana Brodkasta Korporacio) en Okayama. Estas feliĉe, ke mi trafis la televidan intervjuon. Fusako estas instruistino de la Knabina Mezlernejo. Antaŭ mia vojaĝo al Japanio, ŝi aranĝis por mi la viziton. Knabinoj de la Esperanto-klubo, kiuj venis el malsamaj studfakoj de la mezlernejo, estas tre



aktivaj kaj amindaj. Kvankam ili estas komencantoj de Esperanto, tamen ili kuraĝe babilis kun mi en Esperanto. Laŭ la peto de Fusako, mi gvidis la knabinojn fari voĉlegon kaj dialogon. Raportisto de televida stacio registris la lecionon, kaj intervjuis la knabinojn rilate al ilia lernado de Esperanto. Poste mi intervjuis angle la raportiston. Li nomiĝas Ryuichi Yoshikawa. Li diris, ke antaŭe li ne sciis kio estas Esperanto ĝis li informiĝis pri la 92-a UK kun la ĉeesto de miloj da esperantistoj el pli ol 60 landoj. Li montris grandan intereson pri Esperanto kaj esprimis deziron por plua atento.

Sekvatage, mi vojaĝis al Himeĵi-Kastelo kaj poste al la tradicia strato de Kuraŝiki, la plej japanstila urbo. Antaŭe mi ĉiam spertis japanan tradicion kastelon kaj straton en japanaj pentritaj filmoj kaj libroj. Kiam mi spertis la verajn, mi sentis ĝojigan aŭtentecon. Kiam mi vizitis la du vidindaĵojn, mi renkontis grupojn de antaŭkongresa ekskurso de 92-a UK. Mi pli kaj pli proksimiĝis al la Esperantujo!

→ Jokohamo, la 92-a UK de Esperanto

Kunportante pezegan pakaĵon, mi atingis Jokohamon de Okayama, kaj loĝis en la hotelo Escal kune kun aliaj invititoj de Japana Esperanto-Instituto. En la orientado vespere, mi unuafoje renkontis faman japanan esperantiston s-ron Hori Yasuo, pri kiu antaŭe mi jam multfoje aŭdis kaj korespondis surrete. Li estas ege ĝentila kaj zorgema, kaj eble pro tio, li estis respondeculo de la invitataro. Post detala konigo de koncernaj informoj kaj sinprezento de la invititoj en la orientado, mi bone konis miajn taskojn dum la kongresa periodo. Plaĉas al mi ankaŭ la tradicia “lito” de Japanio–Tatamo ĝi donis al mi dolĉan dormon kaj sufiĉan energion por prezenti min en Esperantujo.

Komenciĝis la Jokohama UK! La kongresejo nomiĝas Pacifiko-Jokohamo, la velŝip-forma konstruaĵo ĉe maro, ege bela loko. En la kongresejo, mi renkontis multajn malnovajn amikojn, kiujn mi konis en la 89-a Pekina UK aŭ la 58-a Internacia Fervojista Esperanto Federacio en Ŝanhajo aŭ voĉe en Skypo. Ni kunĝuis la amikecan etoson en la amikeca loko. Dum la kongresa periodo, miaj sakoj ĉiam estis pezaj, ĉar mi kunportis ne nur koncernajn dokumentojn pri la UK, sed ankaŭ intervjuilon, fotilon, donacojn al intervjuintoj kaj aliajn. Ĝuante la kongreson, mi devas ankaŭ registri miajn impresojn per mia intervjuilo. Iuj bonkoraj amikoj bedaŭre diris al mi, “kara Shanshan, vi devas ĉiam labori kaj ne povas komplete ĝui la kongreson”. Tamen verdire, mi ja ĝojas laborante. Post mia reveno al la laborejo, mi



povas aranĝi miajn memoraĵojn ne nur per fotoj, sed ankaŭ per sonoj.

En la interkona vespero mi konis multajn novajn amikojn; spertis veran japan-stilan kulturon en la nacia vespero; ĝuis junecan energion en la junularaj agadoj en Zaim; manĝis bongustegajn suŝiojn kaj aliajn tradiciajn manĝaĵojn de Japanio; vojaĝis al la pitoreskejo–Fuĵi-monto, kaj fariĝis atestanto unuafoje en mia vivo por la nekonata brazila junulo, kaj feliĉege li sekurece revenis; propre gustumis specialan bankedon kaj balon kaj iom dancetis surhavante belan jupon; partoprenis en tute ne forgesebla Oratora Konkurso kaj gajnis la duan premion, kiu ege ĉargrenis min en la komenco, ĉar mi celis la unuan lokon, tamen poste mi tute trankviliĝas pri tio kaj sentas veran ĝojon; spertis mirindan promenadon ĉe maro sen ŝuoj, kaj vidis, ke Jokohamo vere estas purega urbo; mi sentis min ege komforta kaj ĝoja kiam mi staris, sidis, promenis eĉ ploris ĉe maro... ..

Multege, multege da belaj memoroj por mi en bela Jokohamo. Ĝuste nun, kiam mi skribas tiun ĉi artikolon, la belaj memoroj flugas antaŭ miaj okuloj. Ferminte la okulojn, mi eĉ povas flari odoron de la UK kaj de la maro en Jokohamo. Mi vere dankas la Japanan Esperanto-Instituton, s-ron Hori Yasuo, s-ron Hideki Harada, s-ron Nomra kaj aliajn, kiuj helpis min.

Dum la 7-taga UK, mi spertis multege, tamen inter la memoraĵoj unu estas por ĉiam ne forgesebla kaj devas esti menciita. Mi devas diri, ke helpantoj kaj LKK-anoj estas ege bonkoraj kaj zorgemaj. Dum la kongresa periodo, mia komputilo trafis viruson kaj ne funkciis. Mi estis ege ĉargrenita, ĉar mi devis ĉiutage sendi fotojn aŭ raportojn pri la UK al miaj kolegoj en Pekino por plenumi mian laboron, senkomputila, mi povis fari nenion. Tiam mia akceptanto en Japanio s-ro Hideki Harada proponis al mi peti helpon de la gazetara servo de LKK. Kunportante la komputilon, mi prove iris al la gazetara servo kaj elmontris mian malfacilon. Iu junulo, kiu ege bone ludas komputilon, pacience helpis min preskaŭ en tuta posttagmezo. Kvankam finfine la virusoj ne estis tute mortigitaj, tamen mi estis vere kortuŝita pro lia zorgemo. Eble la junulo jam forgesis la aferon kaj pensis, ke tio estas nenio, tamen por mi male. Mi estas tiel forgesema, ke mi eĉ ne memoris nomon de la junulo, tamen ĉiuokaze, elkoran dankon al li!

Mirindaĵoj, kiujn mi spertis en la Esperantujo, okazis preskaŭ ĉiu-tage. Ekzemple, en la oficejo de la gazetara servo, mi renkontis ankaŭ s-ron Mizro Iwaya.



Antaŭ 3 jaroj en Pekina UK, mi estis lia ĉiĉerono al Granda Muro, post 3 jaroj en Jokohamo, li estis mia ĉiĉerono al Fuji-monto. Dum la vojaĝo al Fuji-monto mi konis Joaquín, esperantiston el Meksikio. Post mallonga parolado, ni nekredeble rimarkis, ke ni havis la saman komencan instruiston de Esperanto—s-ro Li Weilun, nuna prezidanto de Pekina Esperanto-Asocio. Antaŭ preskaŭ 20 jaroj, la aktiva ĉina esperantisto studis en Meksikio kaj organizis Esperanto-kursojn tie. Joaquín ja estis unu el la lernantoj. Nekredeble, ke iu meksikiano kaj ĉino, kiuj havas tian rilaton, tiel renkontiĝis en Japanio.

La ĝojigaj aferoj estas vere multaj, mi ne povas elnombri ĉion. Mi ankoraŭ memoras, ke en la lasta vespero de la Jokohama UK, kiam mi estis en Zaim, la kunveno de junuloj, mi estis ege ĉagrenita. Ĉar mi pensis, ke la 7-taga kongreso estas ege mallonga, mi ankoraŭ ne sufiĉe gustumis ĝin, mi ĵus konis iujn ege bonajn amikojn kaj la kongreso baldaŭ finiĝos, ni devas disiĝi. Akcepti la veron aŭ ne, la kongreso finiĝis kaj mi devas tiel konsoli min mem per la antikva popoldiro de Ĉinio, “La hodiaŭa disiĝo estas por la morgaŭa plibona renkontiĝo”.

→ Ajabe → Kameoka → Hiroŝima → Miyazima

Post la Jokohama UK mi vojaĝis al Oomoto-centroj Ajabe kaj Kameoka. La oomotanoj estis ege gastamaj kaj donacis al ĉiuj partoprenintoj Yukata (somera kimono). Mi proponis al ĉiuj esperantistoj, kiuj vojaĝos al Japanio, sperti Oomoton en la du gubernioj. Tio estas ege speciala sperto. Mi vojaĝis ankaŭ al la Memormuzeo de Atombombitoj de Hiroŝimo, propraokule vidis la depresion post eksplodo de la atombomboj kaj la nuna prospero de Hiroŝimo, kaj estis kortuŝita de la diligentuloj. La ruĝa antikva konstruaĵo en Miyazima ankaŭ ege plaĉas al mi.

→ Ĉina Radio Internacia, Pekino

Portante kolorriĉajn memoraĵojn, pezegajn pakaĵojn kaj plenajn sonbendojn mi revenis al Pekino, al mia laborejo. Rilate al la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo, mi skribis artikolojn, raportojn, faris intervjuojn je ĉirkaŭ 30 rete kaj radie; kaj enretigis kelkdekojn da fotoj pri la 92-a UK.

Karaj geamikoj, en la fino de mia artikolo, mi volas diris, ke mi estas tiel feliĉa kiel vi ĉiuj pro elekto de Esperanto. Kunportante Esperanton, ni povas koni amikojn tutmondajn, vojaĝi al diversaj landoj, ĉar ni havas familianojn ĉie tra la tuta mondo!

Refojan elkoran dankon al Japana Esperanto-Instituto, s-ro Hori Yasuo, s-ro Hideki Harada kaj liaj zorgemaj familianoj!



Cititaj Leteroj – 海外飞鸿

Gratulletero al nova israela prezidento Shimon Peres

Laŭ informo de Amri Wandel, la 13-an de junio ĉi-jare, Shimon Peres estis elektita kiel prezidento de Israelo kaj pro tio prezidanto de UEA Renato Corsetti, Esperanto-Ligo de Israelo kaj aliaj sinsekve sendis al li gratulleterojn pro la elekto. Peres estis alta protektanto de la 85-a UK en Tel-Avivo en 2000 kaj nobel-premiito pri paco en 1994, kies ĉefa temo estis "paco kaj interkompreniĝo".



Oni esperas, ke Peres, kiel monde konata senlaca batalanto por paco kaj interkompreniĝo de popoloj, povos gvidi Israelon al vera paco en Mezoriento. Tio ankaŭ estas deziro de la pacama ĉina popolo.

Unujariĝos Radio Aktiva

Laŭ informo de Daniel Bebelacqua el Urugvajo, la elsendo de Radio Aktiva komenciĝis 21-an de septembro, 2006. Nun ĝi alproksimiĝas al unu jaro de sia ekzisto. Okaze de la unujariĝo en septembro ili kalkulos pri la atingoj kaj ne-atingoj. Nun, same kiel Ĉina Radio Internacia, ili klare

scias gravecon de aŭskultantoj en la ekzisto de la Radio. Tial ili esperas, ke la aŭskultantoj konektu sin al Radio kaj sciigu: Ĉu oni aŭskultas rekte aŭ per podkasto por ke la Radio estu via kaj iĝu vera ponto de Esperantujo.

Radio Aktiva elsendas ĉiutage dum la 24 horoj. La programaro daŭras inter 2 kaj 3 horoj proksimume kaj ripetigas dum la tuta tago. La enhavo de la programo ŝanĝiĝas ĉiutage.

Okaze de unujariĝo de Radio Aktiva, ni esprimas varman gratulon kaj esperas bonan kunlaboron!

Letero de Joop van der Hoeven el Nederlando:



Feriante kiel pensiulo en la okcidento de Nederlando, mi trovis en la halo de mia hotelo turismajn afiŝojn. Okulfrapa estas la okazigo de la grandskala Internacia Foiro en

Beverwijk, en kiu partoprenas ankaŭ ĉinaj entreprenoj. Laŭ la ĉina reklamo, en la Foiro Ĉinio instalas 1200-kvadratmetran orientan supermerkaton, kiu estas malfermita al la publiko de la 10-a ĝis la 22-a horo ĉiu-tage. Oni povas viziti ĉinajn restoraciojn, kafejojn, klubojn kaj budojn kaj aĉeti ĉinajn varojn.

Mi ofte trovas ŝipojn plenajn de ĉinaj konteneroj tra la rivero Lek de la haveno de Roderdamo al Germanio. Nun en multaj urboj ni povas renkonti ĉinajn komercistojn, turistojn, kuiristojn kaj komizojn.

Mi bonvenigas progreson de Ĉinio. Mi esperas, ke ankaŭ alilandaj esperantistoj esprimos bondezirojn al Ĉinio por ĝia prospero kaj potenciĝo en la mondo.

S-ro Joop van der Hoeven estas unu el niaj fidelaj aŭskultantoj. Li amas Ĉinion kaj la ĉinan popolon kaj ĉiam ĝojas kune kun ĉinoj, kiam Ĉinio gajnis elstaran atingon en ĉiu ajn flanko.

En maj-junia numero de la bulteno <Nederlanda Katoliko> estas publikigitaj liaj du artikoloj: <Nederlanda Nacia Muzeo de Papertondaĵoj> kaj <Ĉinio kaj Esperanto>. Per tiuj du mallongaj artikoloj, li pli detale konigas al nederlandaj samideanoj pri ĉina metiarto kaj pri skribmaniero de la ĉina lingvo.

Bondeziroj el Kubo okaze de la Tago de Patroj



Okaze de la Tago de Patroj ĉi-jare – la trian dimanĉon de junio, geknaboj de la Esperanto-Rondeto “Amiketoj de Zamenhof” el Kubo sendis al ni infanan desegnaĵon “Kiso al patro”, dezirante al ĉiuj ĉinaj esperantistopatroj, partoprenantaj en E-Movado kaj la Movado de Paco kaj Solidareco, feliĉon kaj ĉion bonan. Nome de gefiloj, ili dankas ĉiujn patrojn, kiuj dediĉas amzorgon, senlacan laboron kaj ĉion eblan por sana kresko de la juna generacio.

Bondeziroj de Leopold Patek el Germanio

Okaze de la 120-jariĝo de Esperanto, nia konstanta aŭskultanto Leopold Patek el Aŭstrio sendis al ni plej varmajn bondezirojn el la Esperanto-urbo Herzberg de Germanio. Jen li staras ĉe la turisma buroo.

Memore al la 90-a datreveno de la forpaso de D-ro Zamenhof (14-a de



aprilo, 1917) kaj la 120-a datreveno de la naskiĝo de Esperanto (26-a de julio, 1887), okazis en diversaj lokoj en la mondo abundaj aranĝoj favore al Esperanto.

Kontribuajoj omaĝe al la 5-jariĝo de Mikrofone

Antaŭ nelonge, nia hungara amiko Josefo Kiss kun letero sendis al ni la de li esperantigitan poemon de sia amikino Tereza Turanyi, verkitan antaŭ 40 jaroj, kiam ŝi estis 17-jara. Kvankam oni ne devas konsideri ĝin kiel majstroverkon, tamen la poemo malkaŝis ambivalencajn sentojn de adoleskantino. Unue bonvole aprecu la poemon kaj poste estas ŝia kontribuajoj omaĝe al la 5-jariĝo de Mikrofone.

En via varmo
La vintro ja min ade turmentas,
Glaciungon de ĝi mi plene sentas.
Sonas ie tenta voko amo-voĉe,
Al ĝi mi hastus arde, amar-dolĉe.
Prujno blankas en la ĝarden’
ekstere,
Kaj folioj tretitaj are surtere
Mesaĝas nur pri eksa ekzisto.
Same la rozo lasita en tristo,

Froste velkas kiel orfa gardisto.
Ho, hom-varmo, vi fajrpreta, ŝirma,
Vi pli fortas ol la muro firma;
Soifas mi la kareson vian,
Kiu radiis amon magian –
De kiu venis la sama sento,
Kiu prenis apog-brakon en vento;
Kun kiu mi ridis meznokte, kune,
Disiĝinte unu de l’ alia dume;
Ega amo-tiro nin kunligas tamen,
Kaj mi ja ne plu estos sola mem.

Artikolo de Tereza Turanyi el Hungario:

Mikrofone malfermas por mi novan mondon

Kun ĝojo mi ricevis la novan numeron de Mikrofone, kiu malfermas por mi novan mondon. Mi havas 57 jarojn kaj mia rilato kun Esperanto komenciĝis de ekkono kun la ĉina kulturo kaj ĉinoj. Antaŭ 5 jaroj mi komencis labori en la vendejo de ĉina posedanto en Hungario. Estas tre harmoniaj rilatoj inter mi, la posedanto kaj liaj familianoj. Ni hungare interparolas pri la kulturo, historio, vivkutimoj de la du landoj. Mi estimas la posedanton pro liaj persisteco, diligenteco kaj honesteco. Feliĉe en tiu tempo mi konatiĝis kun nialanda veterana esperantisto Josefo Kiss, kiu instruas al mi Esperanton. Vespere ni pasigas valoran tempon per aŭskultado de la E-elsendoj de ĈRI kaj tio estas granda feliĉo por mi. Mi ĉiam kun granda interesiĝo atendas la sekvantan numeron de Mikrofone.

Publika letero al Vinilkosmo

Vinilkosmo – “Esperanto-Muzik-prod.” Estas fama en monda esperantujo, precipe inter muzikŝatantoj-esperantistoj. De 2001, Vinilkosmo tenas kun E-Redakcio de ĈRI bonan kunlaboron. Ĉiam, kiam aperis nova disko, Vinilkosmo unuatempe donacis ĝin al ni. Ni de tempo al tempo elsendas elektitajn muzikon kaj kantojn en niaj programoj. Plaĉas al ni kaj la muziko kaj la kantoj, precipe al niaj aŭskultantoj. Elkoran dankon al vinilkosm-anoj kaj daŭran kunlaboron!



Mikronovelo – 微型小说

Virinoj



En kabineto estas 2 fieraj virinoj: Azhen kaj Shuhua. Ambaŭ fieras pro tio, ke ili respektive naskis stangohavan idon (filon). Ili do sentas sin multe pli altaj kaj belaj.

Tiutage Azhen portis al Shuhua bonan informon: "Ajuan naskis filinon post cezara operacio."

"Vere?" Floris la vizaĝo de Shuhua, kiu sentis rankorforigan ĝojon.

Ajuan estas kulturosporta estrino de sindikato. Pasintece ŝin, lernejan floran, ĉasis almenaŭ "fortigita plotono" da junuloj. Tiuj uloj, krudalangaj kontraŭ Azhen kaj Shuhua, timide sin ĝenas antaŭ Ajuan, pri kio ili ambaŭ rankore ĵaluzas kontraŭ ŝi. La edzo de Ajuan estas Gu Ping, mekanika teknikisto kaj korbopilka ĉefteamano de la fabriko. Li, gigante alta kaj ĉevale granda, kaj ŝika kaj galanta, tamen plej ĉagrena al la du virinoj kiuj, kompreneble, neniom malkaŝas sian impreson, pro tio ke li neniam rigardas ilin vid-al-vid-e ĉe dum sekundo, kvankam ĉiuj oftege renkontiĝas unu kun la alia pro malgrandeco de la fabriko.

"Gu Ping estas solfilo, ĉu vi ne scias?" Ridias Azhen.

"Vere?" Ankoraŭ pli serenas la ĉielo en la okuloj de Shuhua kiu imagas, kiom li ĉagreniĝas. "Ho! La patrino de mia viro estas tiel senkompata al sia 1-a bofilino pro tio, ke ŝi naskis filinon. Post ties akuŝo ŝi kuris en parkon por sin hardi per glavo. Sed al mi, ŝi tiom bonas, jen brunan sukeron jen ovojn donas." En fieriga feliĉo ŝi dronas.

"Certe la patrino de Gu Ping estas tia, kia via bopatrino." Azhen ne ĉesas fari trikadon. "Al kio la ĉarmo utilas? Nur floro en potoj, ne povas elbaki filon, plaĉas sole al la edzo, naŭzas la bopatrino."

Sinjoro Ji, direktoro de la fabriko administrejo, puŝas la pordon kaj envenas. Li ĵetas kelkon da ruĝaj

pakoj sur tablon.

"Ŭa sej! Bombonoj!" Azhen gaje senŝeligas pecon kaj ŝovas ĝin en la buŝon.

Ekridinte, la direktoro sin turnas al Shuhua, "Mi scias, ke vi denove laŭdis la bopatrino. Sed kiel ŝi traktus vin, se vi havigus al ŝi nepinon?"

Li ridetas. "Nu, bombonojn! Donacitajn de Gu Ping."

"Kio? Gu Ping?" Surpriziĝas la du inoj, gapantaj al sinjoro Ji.

Li kapjesas. "Lia patrino nun ankoraŭ flegas Ajuan en la akuŝejo. Li aĉetis bombonojn kaj cigaredojn, kontraŭ pli ol 300 juanoj, kaj konfidis, ke mi helpe disdonu ĉiom en la fabriko." Sekve li aldonas, "La patrino de Gu Ping ploris en koridoro de la akuŝejo..."

"A! Vere?" La ina duo ekviglas. Kaj Azhen, "Pro tio, ke Ajuan naskis filinon? Jam estas nova epoko. Jam egaleco inter viro kaj virino. Kial plori..."

"Ne pro tio! Tiam Ajuan ne naskis ankoraŭ. Kiel oni povus scii pri la sekso? Tiam okazis malfacilo. Kuracisto postulis, ke Gu Ping faru subskribon, kaj demandis, kiun oni gardu, la naskonton aŭ la idon. Gu Ping preferis sian edzinon. Subskribinte sian nomon, Gu Ping forte nervoziĝis kaj larmis. Vidinte, ke la filo tiom amas sian edzinon, la patrino tre kortuŝiĝis. Poste nenio okazis kaj al Ajuan kaj al la ido. Tre sekure. Kaj Gu Ping ege ĝojis. Kaj li aĉetis la bombonojn kaj cigaredojn, kaj ke mi faru la distribuadon..."

Mutis la 2 virinoj.

S-ro Ji fiksas suflozan rigardon al ili. "Babilante pri la nasko, vi ofte forgesis, ke vi mem estas virinoj. Senintence vi distretis la virinajn dignon kaj personecon. Ho, mi jam diru plu nenion! Bombonon, bombonon!"

- Chen Yanlin





Tra la Mondo – 世界各地

Mesaĝo de Povilas Jegorovas el Litovio pri BET-43

De la 14-a ĝis la 22-a de julio, 2007, en nordlitovia urbo Siauliai okazis Baltiaj Esperanto-Tagoj-43. Tiu ĉi jam la 43-a tradicia aranĝo estis dediĉita al la 80-jariĝo de organizita Esperanto-movado en Siauliai. Ĝin organizis Litova Esperanto-Asocio kune kun urba Esperanto-klubo "Ruto". La aranĝojn partoprenis 322 esperantistoj el 18 landoj. La evento altiris grandan atenton de lokaj kaj tutlandaj amaskomunikiloj.

La aranĝo okazas ekde 1959 ĉiu-jare laŭvice en Latvio, Estonio, Litovio. Tiu ĉi BET fariĝis la plej amasa en tiu ĉi jardeko, jarcento kaj jarmilo.

Sekva BET-44 okazos de la 5-a ĝis la 12-a de julio, 2008, en latva urbo Ventspils.

Du novaj Esperanto-objektoj en germana urbo Herzberg

La 30-an de junio, 2007, en Herzberg—la Esperanto-urbo inaŭguriĝis du novaj Esperanto-objektoj memore al la 50-jara aktiva agado de la elstara kaj multtalenta Esperanto-pioniro Joachim Gießner el Herzberg (1913 - 2003), kiu ankaŭ estis estro de la fervoja stacidomo en Herzberg.

Jen la inaŭgurĉeestantoj antaŭ la du novaj E-objektoj:

Minejtrajna vagoneto kun la dulingva biografio pri Joachim Gießner kaj la nova dulingva bonvenigŝildo malantaŭ la minejtrajna vagoneto.

Interkultura Centro Herzberg



Horaro de Esperanta Disaŭdigo de Ĉina Radio Internacia

UTC	Regionoj	Ondo	KHz
11:00-12:00	Japanio, Koreio	294,99	1017
13:00-14:00	Sudorienta Azio	25,75 31,78	11650 9440
19:30-20:30	Eŭropo	30,79 41,29	9745 7265
22:00-23:00	Latin-Ameriko	30,43 25,64	9860 11700
18:00-19:00	Albanio kaj periferiaj landoj		1215

Konstanta adreso: Esperanto-redakcio, CRI-36, Ĉina Radio Internacia Poŝtkesto 4216, Pekino, Ĉinio, 100040

Tel: +86(10)68891940

Fax: +86(10)68891164

Retadreso: espradio@cri.com.cn

Retpaĝo: <http://esperanto.cri.cn>

Ĉina Radio Internacia (ĈRI) komencis la Esperantan disaŭdigon en la 19-a de decembro, 1964. Ĉiutage la Esperanto-disaŭdigo direktiĝas po unu horo respektive al Eŭropo, Latin-Ameriko, Nordorienta Azio kaj Sudorienta Azio.

Esperanto-redakcio de ĈRI ankaŭ periode renoviĝas rubrikojn laŭ aktuala bezono aŭ propono de aŭskultantoj. Cetere, ĝi donas de tempo al tempo specialan programeron pri io grava, okazigas aktivadon pri aparta temo kaj aranĝas konkurson.

La Esperanto-redakcio de ĈRI ĉiam deziras pli bone servi al diverslandaj aŭskultantoj kaj sincere bonvenigas iliajn kritikojn kaj proponojn.

CRI  **online**
Esperanto

<http://esperanto.cri.cn>
(2007年第三期 总第19期)

Tel: +8610 68891940
+8610 68891916

Fakso: +8610 68891164

E-mail: espradio@cri.com.cn

Adreso: Esperanto service, CRI-36
China Radio International
P.O. Box 4216 Beijing, China 100040

